# *Ekas la ordinara sesio de la kuba parlamento.*



La laboro de la parlamentaj komisionoj sesiis dum tri tagoj por glatigi la vojon al la plenkunsido **de** la kuba parlamento ?i-venontan merkredon.

La mapleksa agendo de tiu laborgrupoj de la parlamento ebligis trakti la temojn surbaze de vizio kiu startas en la bazo kaj inkluzivas anka? la nacion, interalie temoj pri strategiaj programoj entreprentaj de la registaro, temoj tiklaj ligitaj  al la lo?antaro proponitaj de foraj kaj proksimaj distriktoj.

Oni anka? analizis temojn rilate al la infanaro kaj la junularo, la amuzi?o, malfacila?oj rilate al la akvo-provizado, anka? rilate al sano, sporto, komunumoj, la deliktoj, koruptado, apliko de la spertoj evoluigitaj en la provincoj de Artemisa kaj Mayabeque; la reorganizo struktura de la ministerio pri komunikado, i.a.

Unu el la temoj traktitaj pri ?i lasta rilatas al la agado establita en la gvidlinioj de la registaro kaj la komunista partio pri la avancoj bezonataj kaj preparataj cele al informadika socio, kiu kontribuos al la landa evoluo.

La konkludoj de tiuj ?i debatoj estos prezentitaj al la Nacia Asembleo kiu pritrasktos ilin en ordinara sesio ekde ?i-tiu 15-a de julio en Havano.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/62513-ekas-la-ordinara-sesio-de-la-kuba-parlamento

# Radio Habana Cuba